

Esperanto

3

1982

MONATA REVUO
FONDITA
EN JARO 1903

OFICIALA ORGANO
DE I.K.U.E.
INTERNACIA
KATOLIKA UNUIGO
ESPERANTISTA



ESPERO KATOLIKA

Honora Prezidanto:

Sac. Alfons Beckers
Rozenlaan, 5
B-3950 Beringen (Belgio)

Prezidanto:

Sac. Duilio Magnani
viale C. Zavagli, 73
I-47037 Rimini/Forlì, Italio

Vicprezidantoj:

Sac. Roger Degrelle, B.P. 23, F-54510 Tomblaine,
Francio;
Sac. Józef Gotter, Trzebnice 113, PL-59.312
Chocianowic, Pollando

Sekretario:

Antonio De Salvo

Kasisto:

Sac. Felice Ruaro, I-37010 Costermano (Verona),
Italio

Estraro:

A. Beckers, R. Degrelle, A. De Salvo, R. Forycki,
J. Gotter, L. Kóbor, J. Kondor, J. Korytkowski,
F. Ruaro, J. Zielonka

Plenumkomitato:

Aŭstrio: W. Mudrak; *Belgio:* E. Paesmans; *Ĉeĥo-
slovakio:* J. Pastrnakova, M. Sváček; *Francio:* L.
Bourdon; *F.R. Germanio:* B. Eichkorn; *Hispanio:*
M. Casanoves; *Hungario:* E. Stancz; *Italio:* A. Cic-
canti, S. Giacchino, G. Pisoni; *Nederlando:* S. P.
Smits; *Pollando:* J. Korytowska, J. Kos, B. Sobol;
Svislando: F. Bommer; *Usono:* K. Laughery

Centra Oficejo:

Via Berni, 9
I - 00185 Roma (Italio)
tel. (06) 7588388
poŝta konto 23290000
Direktoro: Antonio De Salvo

Oficiala organo:

Espero Katolika

Kotizo:

22 svisaj frankoj aŭ egalvaloro

Registriĝo ĉe la Tribunalo de Romo

(Registrazione presso il Tribunale di Roma)
n. 17138, 11-2-1978

Respondeca Direktoro (Direttore Responsabile):

Antonio De Salvo
C.P. 4017, I-00100 Roma Appio (Italio)
tel. (06) 7810782 (vespere)

Presejo (Tipografia):

ROTATORI
Viale Manzoni, 22/b - Roma

Sur la kovrilo: Florenco (Italio), -preĝejo « Orsan-
michele », *Anunciacio* de Orcagna (14-a jarcento).

ENHAVO

- 27 Konsekriĝo al Maria (*D. Magnani*)
- 28 Al Nia Sinjorino Ĉenstoĥova - Krist-
nasko 1981 (*R. Mc Dermott*)
- 29 Katolika horizonto
- 30 Apostolado de la Preĝo (*L. Gonzales*)
- 32 IKEK-Infana Katolika Esperanto-
Klubo (*R. Degrelle*)
- 33 Papaj preĝintencoj por aprilo
- 33 Papaj preĝintencoj por majo
- 33 Sankta Jozefo, la laboristo
(*W. Mudrak*)
- 34 Tra la movado
- 37 Legantoj skribas
- 39 Ni funebras kaj kondolencas
- 40 39-a IKUE-Kongreso
- 41 1-a Kongreso de IKEK
- 41 Por mediti pri la Paco
- 42 Konkurso por Stipendio « Penteko-
sto »
- 43 De Atlantiko ĝis Uralo (*S. Ĉapody*)
- 44 Landaj Reprezentantoj de IKUE

Periodico culturale - gruppo III - pubbl. inf. 70%
lire 600.

Kultura periodaĵo - monata - malpli ol 70% da
reklamo - 600 liroj.

KONSEKRIĜO AL MARIA

Deturnite de sociaj eventoj kaj de aliaj zorgoj, verŝajne malmultaj (laikoj kaj sacerdotoj) eksentis la gravecon de unuaranga religia okazintaĵo: la konsekro al la Senmakula Maria, 8.12.81, fare de la Papo, de ĉiuj popoloj de la tero kaj precipe de Sovetunio. Kaj tio post la atenco de 13.5.81, kvazaŭ respondo al tiom da malamo.

Prof. Patro Stefano De Fiores, fama mariologo, skribis en la ĵurnalo « L'Osservatore Romano » (9-10.12.81): « *Ĉi tiu papa gesto enmetiĝas en nian tempon kiel viva respondo al la malnova kredo, kiu rekonas la Sanktan Spiriton kaj la Dian Patrinecon de Maria. Ĝi esprimas la volon ne interrompi la aman dialogon inter la Eklezio kaj Tiu, Kiun Jesuo Kristo mem donis al ĝi kiel Patrinon. Fine, la konsekriĝo estas ankaŭ esper-anonco, ĉar la propeto de Maria povas elpeti de Dio tion, kio estas malfacila aŭ nebla al la homoj, la renovigon de la Eklezio kaj la pacon inter popoloj* ».

Krome, la graveco de ĉi tiu faro estis emfazita de la Papo mem 23.12.81: « *La finiĝanta jaro lasas en nia koro la dolĉegan rememoron de la celebroy pri la 16-a jarcento de la unua Konstantinopola Konkilio kaj pri la 1550-a datreveno de tiu Efesa. La memorigaj ceremonioj... kiuj vidis en Romo... la reprezentantojn de la tutmonda Episkoparo... atingis la pinton en la ĵusa soleno de la Senmakula Koncipiĝo, per la konfido, de mi renovigita, de la tuta Eklezio al Maria, Dipatrino, Edzino kaj Templo de la Sankta Spirito* ».

Ĉu eble ĉi tiu historia evento plenumis (bedaŭrinde, tro malfrue!) la Fatiman Alvokon, per kiu oni petegis la « *konsekron al la Senmakula Koro de Maria, ĉu de la mondo ĉu de Sovetunio, fare de la Papo kunlige kun la tutmonda Episkoparo* »? (*).

Kia estas nia tasko? Papo Paŭlo sesa skribis siatempe: « *Ni admonas ĉiujn gefilojn de la Eklezio renovigi persone la konsekriĝon al la Senmakula Koro de la Dipatrino de la Eklezio, kaj travivi ĉi tiun noblegan kult-agon per vivo ĉiam pli konforma al la Dia Volo, en spirita sinteno de fila servado kaj pia imitado de la ĉiela Reĝino* » (*Signum Magnum*, majo 1967). Do, la tutmonda konsekriĝo devas esti ripetata persone, grupe, paroĥe, movade... Ju pli ĝi ripetiga, des pli ĝi enprofundiĝas en la korojn. Tion konsilas al ni ankaŭ nia kunprotektanto Maksimiliano Kolbe. Ni ne rajtas citi lin nur en rilato kun Esperanto. Lia fervora devoteco al Maria gvidos nin, kiam (**), oni konsekros la IKUE-movadon al la Senmakula.

Laŭ la bela esprimo de Mons. Francesco Franzì, Help-Episkopo de Novara (Italio): « *Kun Maria renkonte al Jesuo, al la tria ĵarmilo de la Elaĉeto!* ».

Sac. Duilio Magnani

(*) Mons. Jozefo da Silva Coreira, Episkopo de Leiria-Fátima (Portugalio), tiel skribis al la Papo Pio 11-a en 1937: « *... Tiu ĉi monaĥino (Luĉia) petegas min skribi al Via Sankteco, ke, laŭ ĉiela revelacio, la Bona Dio promesas ĉesigi la persekutadon en Sovetunio, se Via Sankteco bonvolos efektiviĝi — kune kun ĉiuj Episkopoj de la katolika mondo — solenan kaj publikan ripar-agon kaj konsekron de Sovetunio al la Koroj de Jesuo kaj Maria...* ».

(**) V. EK 10-11/81, p. 167. Laŭplane, la konsekriĝo de la IKUE-movado al Maria okazos dum unu el la Esperanto-elsendoj de Vatikana Radio, aŭ 13.5.82 aŭ 19.5.82 (okaze de speciala programo kun maria karaktero).

AL NIA SINJORINO ĈENSTOĤOVA

KRISTNASKO 1981

Polujo sub kruela nokto
de mallumo kaj silento.
Apudas Betlehemo Kalvarion.
Kaj vi, Maria,
ĉion vidas, ĉion aŭdas,
de ĉi tiu lando la senfinan
martirigon
solene priatestas,
senparole.

*Ĝis kiam la Sinjoro
kaŝos sian vizaĝon?
Ĉu ne finfine prudentiĝos tiuj,
kiuj manĝas lian popolon,
kiel oni manĝas panon?*

Ĉi landon vi rigardas
trist-okule, nenion promesas.
Tamen via vizaĝo pravundita
jam per si mem parolas
solidarece.

Roderic Mc Dermott, Britio


-
- La 42-a Hispana Kongreso de Esperanto okazos en Malago, Andaluzio, de la 16-a ĝis la 22-a de julio 1982. Adreso: P. k. 34, Malaga, Hispanio.
 - Pentekoste (28-31.5.1982) havos lokon en Münster, F.R. Germanio, la 60-a Germana Esperanto-Kongreso. Informoj ĉe Willi Brandenburg, Brinker Damm 24, D-4404 Telgte, F.R. Germanio, tel. (2504) 8360.
 - La Esperanto-Klubo de Antverpeno («La Verda Stelo», Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio, tel. 3231343400) rezervigas al eksterlanda vizitanto la programon de la dua vendredo de ĉiu monato. La klubo proponas al kandidatoj (kiuj avertu almenaŭ unu monaton antaŭe) 1.000 belgajn frankojn, vespermanĝon kaj tranoktadon ĉe Esperantisto.

Ne forgesu aŭskulti la esperanto-elsendojn el Romo kaj skribi al la redakcioj (Radio Vatikana, Piazza Pia 3, I-00193 Roma, Italio; Radio Roma, C.P. 320, I-00100 Roma centro corr., Italio).

Petu la senpagan program-bultenon!

KATOLIKA HORIZONTO

● Guas grandan sukceson en Madagaskaro iu eleganta bildo-stria biografio de Sankta Francisko el Asizo, prizorgita de la itala kapuceno Gabriele Nicolai. Temas pri 142 desegnaĵoj, kun teksto simpla kaj esenca, taŭga por la amasoj. La sekreto de la sukceso kuŝas en la beleco de la bildoj kaj en la senriproĉa lingvaĵo. La vivo de Sankta Francisko estas elmontrata en la plej karakterizaj momentoj: aparte estas emfazata la amo de la Sanktulo al la naturo, por kiu malagasoj havas religiecan respekton.



La Verna (Italio): la ŝtona lito de S. Francisko

● Sekve de atentigoj fare de kelkaj Episkopoj, kiuj, en siaj diocezoj, troviĝas antaŭ politikaj kaj sindikataj iniciatoj de la pastraro, la Vatikana Kongregacio pri Klerikaro ĵus aperigis dokumenton, kiu malpermesas al la sacerdotoj partopreni en asocioj aŭ movadoj kun politika aŭ sindikata karaktero.

La Kongregacio substrekis, ke tiaj asocioj aŭ movadoj naskas malkonkordon kaj disiĝon ĉe la fideluloj kaj ĉe la pastroj mem, precipe en tio, kio koncernas iliajn rilatojn kun la Episkopoj.

La dokumento ne indikas eksplicite iun movadon aŭ iun Landon; ŝajnas, tamen, ke temas precipe pri tiuj pastraj asocioj, kiuj, en kelkaj orienteŭropaj landoj, starigis kunlaboron kun la civilaj aŭtoritatoj. La plej grava el tiuj movadoj estas la « *Pacem in Terris* » (Ĉeĥoslovakio); ankaŭ grava la hungara movado « *Pastroj por la paco* », tre proksima al la pozicioj de Sovetunio. Tiuj asocioj, agnoskitaj de la registaroj, estas ĝenerale en konflikto kun la Episkoparoj.

APOSTOLADO DE LA PREĜO

Vi ne povas preĝi tutsole: simple ĉar Dio estas ĉiam kun vi.

Sed vi havas la malĝojan privilegion *vin senti sola*: ĉar ne ĉiam vi konscias, ke Li estas en vi.

Se vi estus « sola » vi ne povus preĝi: ĉar nenion vi povas fari sen Li, kaj ĉar ne havas signifon iu preĝo, kiu ne adresas sin al iu ĉeestanta Vi.

Ĉu vere vi estas konvinkita, ke preĝi ne estas paroli kun vi mem, sed kun « Aliulo », kiu superas vin, ĉar Li amas vin?

Pro tio ni neniam povas preĝi tutsole.

* * *

Sed tio signifas ankaŭ alian aferon.

Kiam vi preĝas vi ne estas sola: ĉar en vi ĉeestas ankaŭ la Eklezio, ĉeestas viaj gefratoj.

Vi estas manifestiĝo de la vivo de la Eklezio.

Kiel la arbo, kiu pleniĝas per burĝonoj je printempo.

Vi apartenas al la raso de la gefiloj de Dio.

Pro tio la heredaĵo de la Prapatroj, viaj antaŭuloj en la kredo, apartenas al vi.

La preĝo de la iamaj hebreoj, kaj la preĝo de la unuaj kristanoj kaj de tiuj kiuj sekvis, estas via propraĵo.

Jen, interalie, la signifo de la « Komuneco de la Sanktuloj ».

Pro tio, sen vanteco, simple vi povas alproprigi al vi la Psalmojn kaj ilin diri kvazaŭ vi estas ilia aŭtoro.

Vi povas ripeti « Patro nia »-n, la preĝon kreitan de Jesuo, kvazaŭ vi mem ĝin eldonas unuafoje.

Vi ne preĝas tutsole: akompanas vin iu « amaso de atestantoj », kiu antaŭis vin el la kredo.

* * *

Ĉu preĝi tutsole?

Tio ne eblas. Kaj, krome, tio signifas alian aferon.

Kiam vi preĝas, aliaj homoj nevideble preĝas kune kun vi.

Ili estas viroj kaj virinoj kun nekonataj vizaĝoj, kiuj akompanas vin.

Vi ne devas miri pri tio.

Samkiel ĉe rigardado de televido: ĉu vi pensis, ke miloj aŭ milionoj da spektantoj estas rigardantaj la malgrandan ekranon?

Tiel, kiam vi preĝas, nenombrelaj okuloj kaj manoj de viaj gefratoj rigardas al la sama vizaĝo de l' Patro.

Kiam vi rigardas al la Patro, kiel vi povas ne konscii, ke en tiu sama momento vi estas en konekso kun multaj aliaj homoj?

Ne, vi ne estas sola, kvankam vi ekvidas neniun ĉirkaŭ vi.

Ili estas malproksime, sed ĉirkaŭ iu sama Patro.

Trairu mense la tutan terglobon: ekzistas neniun angulo, surtete, de kie ne leviĝas preĝo, « Patro nia ».

Aŭskultu la eĥon de ĝia voĉo, kaj sentu vin stimulita de la fido kaj la espero de kelkaj kaj kortuŝita pro la tento kaj la mallumo de aliaj.

Ni ĉiuj estas gefratoj.

* * *

Ne esti sola signifas, fine, ke vi ne povas malinteresiĝi pri la bezonoj de la aliaj.

Ĉar ne sufiĉas, ke vi atingu pozitivajn rezultojn, dum tiom multe da aliaj gefratoj suferas pro malsato kaj doloro.

Prenu sur vin la malĝojojn kaj la ĝojojn de la aliaj.

Ĉu la Koncilio ne diris, ke la kristano estas iu, kiu surprenas kiel siajn la malĝojojn kaj la ĝojojn, la esperojn kaj la suferojn de la homoj, precipe de tiuj pli mizeraj? (*Gaudium et Spes*, 1).

Komencu de ĉi tie esti vera kristano.

Ŝurprenu iliajn malĝojojn kaj ĝojojn kiel viajn.

Tion instruis al ni Jesu-Kristo: sufiĉas nek *via* pano ĉiutaga, nek la pardono de *viam* ŝuldoj, nek *via* liberigo de l' Malbono.

Vi devas peti plurale: *nian* panon ĉiutagan, la pardonon de *niam* ŝuldoj, kaj la *komunan* venkon super la Malbono.

* * *

Vi ne estas sola: nun vi komprenas tion plibone, kvankam ankoraŭ ne tute.

Preĝi kun aliaj signifas senti solidarecon kun la problemoj de la homoj.

Alkutimiĝinte vivi en nia « eta mondo », ni maltrafas la perspektivon de la universaleco.

La ĉiutaga ĵurnalo devus igi sentiva nian preĝon: ĉar ĝi parolas al ni pri « la malĝojoj kaj la ĝojoj » de la homaro.

La koro de l' Papo estas ankaŭ bona indikilo de la homara situacio.

Kaj la Papo komunikas al ni ĉiumonate, pere de la Apostolado de la Preĝo, kelkajn el siaj zorgoj.

Pro tio, preĝi laŭ la intencoj de l' Papo estas vibri kun la Koro de Kristo, igi miaj la problemojn de ĉiuj homoj, kaj senti min unuiĝinta kun multaj miloj da kristanoj, kiuj samtempe preĝas laŭ la sama intenco.

Kial ne ankaŭ vi preĝas per universala preĝo?

La Apostolado de la Preĝo plifaciligas al vi, se vi tion deziras, la ĉiumonatan aliron al la intencoj de l' Papo.

Sac. Luis Gonzales S.J.

(Ĝenerala Direktoro de la « Apostolado de la Preĝo », Romo)

El la hispana tradukis A.D.S.

Ĉi tiu artikolo estis eksplicite verkita por « Espero Katolika ».

IKEK: INFANA KATOLIKA ESPERANTO-KLUBO

Sendube, se ne diri tutcerte, ĉiu el vi, kara IKEK-ano, jam scias pri nia ĉijara Kongreso en Lille (Francio), kies temo estas LA PACO.

En la antaŭa IKEK-angulo de EK mi diris kelkajn vortojn pri la Paco: temo neelĉerpebla de antaŭe ĝis nun! Estos gravaj prelegoj pri la Paco dum la kongreso:

1 — *Paco kaj homaj rajtoj*

2 — *Paco kaj malarmado*

3 — *Paco kaj senperforto.*

Tamen ne timu: por la IKEK-anoj estos aliaj programeroj kun apartaj geprizorgantoj, kiel jam okazis en la lasta kongreso en Nederlando: ĉiuj geknaboj ĝojis pro la fakto, ke por ili okazis specialaj renkontiĝoj.

Mi do invitas ĉiun el vi partopreni en la Kongreso, skribante al: Centre des Dominicains, 7 avenue Salomon, F-59800 Lille, Francio.

Poezi-flanke:

Pac-akordo, simpla vorto,
riĉa eno, goj-risorto!

Ni esperas, ke al-kuroso
multaj el vi por kongresi
ĉe la francoj kaj progresi
en la amo: pac' lazuros.

Homaj rajtoj, malarmado,
senperforto: ĝoj-kaskado
por kredanto kaj je Dio
kaj je Frato. Venu, venu,
IKEK-anoj, partoprenu
al kunven' de l' pac-ario.

Jesu-flanke:

Dum la fama vespero, dum kiu Jesuo estis arestita samkiel rabisto, Petro aŭdis tiun frazon, kiun mi denove liveras al vi: « *Remetu vian glavon en ĝian ingon; ĉar ĉiuj, kiuj glavon prenas, per glavo pereos* ». Vi trovos tiun frazon en la Evangelio laŭ sankta Mateo, ĉe la ĉapitro 26.

Per tiu frazo, kaj multaj aliaj disaj tra la kvar Evangelioj, Jesuo asertas, ke Li volas la malarmadon kaj aprobas la senperforton. Li ŝajnas diri: « *Viaj manoj estas por helpi kaj ne por frapi; viaj manoj estas iloj de paco, frateco, amikeco; viaj manoj devas man-premi kaj ne vang-bati: remetvian glavon en ĝian ingon* ».

Kaj pri la homaj rajtoj? Relegu la 11-an ĉapitron de la sama Evangelio, kaj vi tuj vidos, ke Jesuo donas aŭ redonas al la homoj la rajtojn je vidkapablo, marŝpovo, pureco, evangeli-aŭdo.

IKEK-flanke:

Mi havas proponon por fari al vi ĉiuj: mi invitas vin, ĉu vi partoprenos aŭ ne en la Kongreso en Lille, pripensu la kongresan temon. Vi povas fari tion unuope, duope aŭ multope, laŭ via bonvolo, bontrovo aŭ ebleco.

Vi povos sendi leteron, poeziaĵon kaj — kial ne — desegnaĵon, kiuj estos en ekspozicio okaze de la Kongreso. Vi povos rakonti tion, kion vi faris, por ke la paco grandiĝu via-familie, via-urbe aŭ vila-vilaĝe, via-lande kaj kial ne, tuta-monde.

Pripensu, agu kaj reagu, skribu, desegnu kaj sendu al *Sac. Roger Degrelle, B.P. 23, F-54510 Tomblaine, Francio.*

PAPAJ PREĜINTENCOJ POR APRILO

Ĝenerala: Por ke la apartaj Eklezioj pli multe konsciu pri sia respondecu koncerne la problemon de vokiĝoj.

Misia: Por ke la modernaj rimedoj de amasa komunikado fidele transdonu la kristanan mesaĝon de vero kaj savo por ĉiuj homoj.

PAPAJ PREĜINTENCOJ POR MAJO

Ĝenerala: Por ke Maria Sanktega malkaŝu al la kristanaĵ virinoj la elstaran dignon de la virino en la kadro de la katolika Eklezio.

Misia: Por pli granda strebo de evangelizado en la medioj tuŝataj de la invado de ateismo.

SANKTA JOZEFO, LA LABORISTO

Jozefo, sankta justa viro,
silenta, de malmulta diro,
modesta, tamen vir' de faro,
kun forta kredo, firma staro;
ne militisto, ne soldato,
sed ĉiam en obea stato
al la ordonoj de l' Sinjoro.
Vi estis viro de laboro!
Ekzemplo via, jen instruo,
ke ne en pozo, ne per bruo
montriĝas de la virto digno:
humilo estas ĝia signo;
kaj ne milita gloro vanta,
sed koro ĉasta, Di-amanta
nin vokas al pli alta celo:
labor-fervor' en Krist-fidelo!

Walter Mudrak, Aŭstrio

● HEROLDO DE ESPERANTO, la plej ofta internacia gazeto de la Esperanto-Movado, estas de 62 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo.

Ĝi proponas: 17 numerojn jare, ilustritajn raportoĵojn el la tuta mondo; junularan, instruistan, literaturan rubrikojn; libreccenzojn, liston de fakaj artikoloj en Esperanto; duoblan kongresan numeron, kalendaron de internaciaj renkontiĝoj kaj kongresoj; liberan Tribunon de la legantaj, anoncetojn, ŝak-problemojn, krucvort-enigmajn, fotofilmon; sciencan suplementon, ktp.

Jara abono por 1982: 16 us. dol. aŭ egalvaloro (490 belgaj fr., 33 ned. guld., 31 germ. markoj, ktp). Mendu provnumeron ĉe la redakcio: Calle de Juan Ramón Jiménez 28, 6^o A, Madrid 16, Hispanio.

TRA LA MOVADO

● Jam de 5 jaroj S. Meso en Esperanto havas lokon, la lastan dimanĉon, de ĉiu monato, en Székesfehérvár (Hungario). La Diservo okazas unu horon pli frue ol la vesperaj S. Mesoj hungarlingvaj, en la kapelo de la preĝejo « Prohaszka ».

● La Gdanska Katolika Oazo de Esperantistoj (Pollando) organizis 23.1.82 sian tradician Solenan « *Oblato-feston* ».

Pro diversaj kialoj, partoprenis ĝin nur 21 personoj; el aliaj regionoj homoj ne povis alveni.

La soleno okazis en la kapelo de S. Adalberto en Sopot. Sanktan Meson celebris la animzorganto, Sac. Stanisław Płatek; du seminarianoj el Pieniężno estis mesoservantoj.

Posta kunveno trapasis en tre kora, amika etoso.

● Ekumena Semajnfino (20-21.2.82) en Aarau, Svislando, kunigis 19 partoprenantojn, kiuj kune meditadis la Sanktan Skribon, por plivalorigi siajn fortojn avantaĝe al la komunajo. Dimarĉe (21.2.82) Sac. Francisko Bommer celebris la S. Meson en Esperanto.

● S. Meso en Esperanto havis lokon en Palencio (Hispanio), en la preĝejo « S.Marina », 28.2.82. Celebris Sac. Jonàs Castro Toledo.

● S. Meso en Esperanto estis celebrita 19.7.81, de Sac. Louis Muller el Belgio, por la partoprenantoj en la Someraj Universitataj Kursoj en Lieĝo, Belgio. Ĉeestis 10 personoj el 7 nacioj; la Meso okazis en kapelo de la preĝejo de Seraing.

● En Banneux (Belgio), 13.9.81, ĉirkaŭ 20 personoj el tri landoj partoprenis la Esperantistan Pilgrimadon al la Virgulino de la Malriĉuloj. Kuncelebris en Esperanto 3 Sacerdotoj. Krom. S. Meso, okazis Krucvojo kaj oni preĝis Rozarion. Dum la ĝenerala plurlingva beno de la malsanuloj, oni aldonis porokaze la Esperantlingvan version.

● En Aubel apud Lieĝo (Belgio), okaze de la 50-a Trilanda Renkontiĝo de la esperantistoj de Belgio, Nederlando kaj F.R. Germanio, 19.9.81 havis lokon S. Meso en Esperanto en la Abatejo de Valdieu. Partoprenis ĉirkaŭ 40 personoj.

● S-ro Karl Ryba (Vieno, Aŭstrio), de 50 jaroj aktiva katolika esperantisto, plenumis 70 jarojn. Gratulojn!

● Sac. Karl Hochgatterer, Aŭstrio, iĝis 70-jara. Gratulojn!

● Nova katolika Esperanto-centro fondiĝis en Toruń, Pollando, kun la aprobo de la loka Episkopo Mons. Marian Przykucki. La centro enkadriĝas en la animzorgaj agadoj de la granda paroĥo « Kristo Reĝo », kies vicparohestro estas la juna kaj kompetenta esperantisto P. Andrzej Srebrzyński.

S. Mesoj en Esperanto estas tie celebrataj ĉiun unuan kaj trian dimanĉon de la monato, je horo 18.45. Unuafoje tio okazis 6.12. 81, kun la partopreno de pli ol 30 geesperantistoj kaj multaj neesperantistoj. La liturgio de la Meso impresis ankaŭ pro esperantlingva kantgrupo, preparita de P. Srebrzyński mem.

● Por festi sian 80-jariĝon (pro kiu ni multe gratulas) Prof. Elio Migliorini el Romo eldonis, 9.3.82, 32-paĝan volumeton en itala lingvo, titolitan « *Pionieri dell'Esperanto in Italia* », kiu entenas pli ol 100 biografiojn de Esperanto-pioniroj en Italio.

● Ekde oktobro 1981 la ĉiumonata S. Meso en Esperanto okazas, en Krakovo (Pollando), ĉiun duan dimanĉon je la 17-a horo, en la Akademia Kapelo de la Preĝejo honore al S. Stefano (str. Sienkiewicza 19), zorge de Sac. Wiesław Martuszewski.

11.10.81 celebris Sac. Antoni Guczwa, en ĉeesto de preskaŭ 200 personoj; kantis la koruso « Kamea ».

8.11.81 la S. Meso estis celebrita de Sac. Martuszewski; same kantis la koruso « Kamea ».

En la kadro de la « *Esperantaj Tagoj de Krakovo* » (11-13.12.81), la S. Meso okazis, ecepte, dimanĉon matene je la 8-a. Kuncelebris Sac. Jan Kos kaj Sac. Martuszewski, en ĉeesto de ĉirkaŭ 200 personoj. Post la Meso tiuj, kiuj estis alvenintaj el aliaj lokoj de Pollando, tuj forveturis hejmen, pro la konataj eventoj.

● En hungarlingva letero al D-ro Josef Kondor (F.R. Germanio) de 12.1.82, kard. László Lékai, Primaso de Hungario, skribis interalie: « *La bona Dio donu al vi multe da korpa kaj anima fortoj. Precipe al via profunde homa kaj kristana helpagado, favore al la lepruloj. Kun admiro mi legis pri la eĉ tre signifaj rezultoj. Tio estas vera esperantista agado = « kun espero en la senespero ».*

● La movado « *Fioritura Francescana* » (Franciskana Ekfloro), Junaj Amikoj de S. Francisko, starigis en Cuneo (nord-okcidenta Italio) iun « *kurson de Esperanto komparata kun aliaj lingvoj antikvaj kaj modernaj* » La kurso okazas lunde kaj jaŭde en la periodo 15.2.82-20.5.82.

● Simpatia iniciato estis alprenita (laŭ sugesto de P. Magnani kaj D-ro De Salvo) de la itala sekcio de IKUE. Konstatinte, ke ĉe la C.O. kuŝas granda kvanto de la ital-lingva versio de la verko de P. Jerzy Korytkowski « *La Chiesa e il problema della lingua ausiliare internazionale* », oni lanĉis alvokon al la

italaj IKUE-anoj por samtempe: diskonigi la verkon al religiaj kaj kulturaj instancoj, informi pri la ekzisto kaj la celoj de IKUE, kaj liberigi iom da loko en la C.O. Per malavaraĵoj donacoj de la italaj IKUE-anoj (kiuj oferis po 1.500 lirojn por la sendokostoj de ĉiu volumo), estis eble havigi senpage la verkon al dekoj da Seminarioj, Bibliotekoj, ktp, kune kun klarigaj leteroj de IKUE kaj de Vatikana Radio. Jam kelkaj fruktodonaj kontaktoj estis starigitaj tiamaniere.

Kompreneble, la kunlaboro estas malfermita ankaŭ al alilandaj IKUE-anoj.

● Longan vivon ni tutkore bondeziras al S-ino Sidonie Scherpon, Aŭstrio, de multaj jardekoj aktiva en la aŭstra katolika Esperanto-movado, kiu ĵus fariĝis *Dumviva Membro* de IKUE, pagante 20-oblan jarkotizon. Por kompreni la simpatian sindonemon de s-ino Scherpon, oni konsideru, che ŝi ĵus plenumis 80 jarojn!

● Dirk de Boer, Hilvoordestraat 175, NL-2284 BN Rijswijk/ZH, Nederlando, jam tradicie kunmetas en albumon la paperojn kaj la bildojn de la KELI-kongresoj. Tiucele, li danke akceptas fotojn, kun dorsflankaj indikoj pri la personoj, pri la Ekumena kongreso KELI-IKUE 1981.

● Kevin Laughery, Komitatano de IKUE, diakoniĝos en la S. Petro-Baziliko en Vatikano 22.4.82.

● La jugoslavaj IKUE-anoj estas invitataj kunveni en Djakovo, en la solejaĵo de Pentekosto: 30.5.82, je la 9-a, en la Seminario (Strossmayerov trg 5, vid-al-vido de la Katedralo, 300 metrojn for de la aŭtobusa stacidomo). Antaŭvidita estas komuna tagmanĝo. Oni anoncu sin ĝin 20.5.82 al la Landa Reprezentanto de IKUE, Sac. Franjo Gruiĉ.

Djakovo festas ĉijare la centan datrevenon de sia Katedralo, kiu estis finkonstruita 1.10.82 de la Episkopo Strossmayer kaj transdonita « *al la gloro de Dio, al la unueco de la Eklezioj, al la konkordo kaj amo de mia popolo* ».

● Estas konate, ke la situacio de niaj polaj gefratoj estas kriza ankaŭ el la ekonomia vidpunkto: tio evidentiĝas precipe ĉe maljunuloj kaj infanoj.

IKUE (kiu daŭre ricevas helpo-petojn de polaj geesperantistoj) jam sendis kelkajn dekojn da plurkilogramaj pakajoj, precipe kun manĝaĵoj kaj medikamentoj. La agado daŭras, en kunlaboro kun ekleziaj instancoj kaj kun apostolaj movadoj, precipe dank' al la sindonemo de P. Duilio Magnani (kiu ankaŭ lanĉis alvokojn sur kelkaj italaj gazetoj).

La pakajoj estas sendataj al unuopaj, selektitaj adresoj, tiel ke oni havu la certecon pri efektiva livero. Kompreneble, laŭ la limigitaj eblecoj de IKUE, temas nur pri guto en la maro de la bezonoj; sed, en la nunaj cirkonstancoj, ankaŭ gutoj efikas.

Kunlaboro estas bonvena.

LEGANTOJ SKRIBAS

● Dankon pro via respondo en EK 1-2/82 koncerne Sanktan Hildegardan. Intertempe mi trovis, en la germanlingva libreto « *ABC der heiligen Namenspatrone* » de S. Müller (Miriam-Verlag, 4-a eldono 1973, p. 28), ke Sankta Hildegarda estas patronino de la esperantistoj kaj de la lingvoesploristoj.

Anton Kronsbage, F.R. Germanio

● Sankta Hildegarda estas patronino de la esperantistoj de la germanlingvaj teritorioj; siatempe, ŝi verkis iuspecan modestan Esperanton.

Walter Mudrak, Aŭstrio

● Mi ĵus pagis la abonon al EK por 1982, favore al mia amikino en Ĉeĥoslovakio, al kiu mi plusendas vian revuon. Sed mi devas konfesi, ke unue mi mem kun intereso legas ĝin, kvankam mi ne estas katolika.

E.O., Nederlando

● Mi klopodas regule aŭskulti la Esperanto-elsendon de Vatikana Radio. Ĝi tre plaĉas al mi: la horo konvena tuj post la Rozario; la voĉoj klaraj, belsonaj; lingvo bona; akcento ĝusta; enhavo riĉa, kvankam konciza pro la limigita tempospaco. Unuvorte mi povas sincere gratuli kaj laŭdi ĉiujn, kiujn preparas, verkas, surbendigas ktp la programon.

Antaŭ nelonge, en iu elsendo, mi aŭdis rimarkon, kvazaŭ riproĉon, kiu trafis min kaj pikis mian konsciencon. La parolistino, interalie, diris: « Kial vi ne skribas? Vi ne silentu, donu vivsignon, sendu vorteton per karto, informu pri la aŭdebleco, donu viajn kritikojn, sugestojn, proponojn... ».

Jes, prave oni riproĉis. Ni ĉiuj kulpas kaj devus honti. Kiom longe ni atendis, petis, deziris, sopiris, ke la Vatikana Radio enkonduku Esperanton en siajn programojn! Fine ni sukcesis, ke ni aŭdas Esperanton el la centro de la Kristanismo; sed, post la unua ĝojo, ni jam al kutimiĝis al la elsendo kaj ne zorgas sendi karteton de tempo al tempo.

Tio ne estas mirinda. Tiaj estas homoj. Bedaŭrinde, oni ne multe taksas valorojn, kiujn oni posedas. Nur malsanulo sciopovas ŝati sanon, nur malsatulo havas apetiton. Kiam ni perdas indajn aĵojn, nur tiam ni konscias pri la trezoro. Tiel ankaŭ ni esperantistoj konsideras la Esperanto-elsendojn kiel ion ordinaran.

Krom tio, korespondado ne plu estas moderna. Iam oni skribis longajn leterojn, oni korespondis, interŝanĝis per poŝto pensojn, ideojn, sentojn. Oni skribis amikajn, amajn leterojn. Hodiaŭ oni malzorgas tion. Estas pli facile persone kontakti, viziti amikojn, karulojn, konatojn. Vojaĝi, flugi, fariĝis tre simpla kaj facila afero. En plej bona kazo oni uzas telefonon, telegramon aŭ sendas salutkarton kun nura subskribo.

Ĉar oni ne havas sufiĉan tempon, hodiaŭ. Ĉiu rapidas, kuras pro troa okupiteco, zorgoj, amuzoj. En tiu rapidemo ni forgesas eĉ plej necesajn

devojn, precipe kiam temas pri spiritaj valoroj.

Sac. Ivo Oreb, Jugoslavio

La analizo de P. Oreb ŝajnas al mi tute ĝusta: oni ne multe taksas tion, kion oni jam havas, kaj oni konsideras normala la ekziston de Esperanto-elsendoj. Mi (kiel redaktoro de la Esperanto-elsendoj de Radio Roma/Itala Radio) povas certigi, ke la afero ne estas tiel « normala », en la senco, ke la praveco de la ekzisto de Esperanto-elsendo devas esti *pruvata ĉiutage*. La stacioj, kiuj elsendas en Esperanto, ne faras tion pro amo al la lingvo kaj al la movado, sed nur pro sia intereso, nome, por disvastigi siajn informojn kaj valorojn: tio validas por ĉiuj stacioj, por Vatikano kiel por Romo, por Pekino kiel por Varsovio aŭ Vieno. La efikeco de la rimedo uzata por la disvastigo de tiuj mesaĝoj estas pruvata nur de la kvanto kaj de la kvalito de la reagoj, nome, de la korespondaĵoj. Oni ne forgesu, ke « Esperantujo » ekzistas nur en la revoj de la Esperantistoj, kaj ke, do, la Esperanto-movado ne havas malantaŭ si iun landon kaj popolon, kiuj pravigu la Esperanto-elsendojn per sia simpla ekzisto. Mi klarigas mian penson.

Radio Roma (pri kiu mi spertas) ricevas, el Pollando, pli da leteroj en Esperanto ol en pola lingvo. Tio ne signifas, tamen, ke en Pollando ekzistas pli da esperantistoj ol da poloj, kaj ankaŭ ne povas doni bazon por forigo de la elsendo en pola lingvo kaj ĝia anstataŭigo per plia elsendo en Esperanto. Oni komprenas, ja, ke malantaŭ la pola lingvo staras tuta lando kaj popolo, al kiu estas konsilinde adresi programon, eĉ se la skribaj reagoj estas malmultaj. Ĉe la esperantistoj, kontraŭe, oni postulas daŭran pruvon de ekzisto kaj pravigon de la neceso elsendi apartan programon.

Jen kial korespondado estas viv-necesa por la Esperanto-sekcioj de la diversaj stacioj. Mi aldonas, ke ankaŭ la *kvalito* de tiu korespondado estas grava, ĉar raportoj de aŭskulto (inkluzive de tiuj negativaj) valoras tre pli multe ol simplaj, ĝeneralaj korespondaĵoj. Tio estas aparte evidenta ĉe Radio Roma/Itala Radio, kie ĉiuj ricevitaj korespondaĵoj estas tradukataj en italan lingvon (kontraŭ pago de honorario!), sed ankaŭ ĉe Vatikana Radio, kie estas tradukataj (senpage) nur la raportoj de aŭskulto kaj la pli gravaj korespondaĵoj.

Adresoj: Radio Vatikana, Esperanto, Piazza Pia 3, I-00193 Roma, Italio; Radio Roma, Esperanto, C.P. 320, I-00100 Roma Centro Corr., Italio.

Antonio De Salvo

● P. Degrelle tute pravas pri Radio Vatikana (EK 12/81, p. 190), kaj mi dezirus aldiri, ke oni povas sendi leterojn ankaŭ nome de aliaj personoj kaj parencoj, kun ilia permeso kompreneble, por pligrandigi la skribeman « aŭskultantaron ». Tiun ruzajon oni uzas fruktodone en Belgio ĉe la gazetaro!

Germain Pirlot, Belgio

NI FUNEBRAS KAJ KONDOLENCAS

† S-ro Jean Ligot, *Francio* (li mortis jam en 1979, sed nur antaŭnelonge ni estis informitaj pri tio);

† Mons. Pietro Cocolin, Episkopo de Gorizia, *Italio* (li estis membro de la Honora Komitato de la 9-a Trilanda Esperanto-Renkontiĝo, kiu okazis en Gorizia en septembro 1977);

† F-ino Ellen Ann Lewis, *Usono* (esperantistino dum pli ol duono de sia 40-jara vivo, ŝi multe aktivis en la regiono de Bostono. En 1969 ŝi konvertiĝis el judismo, kaj — kiel ŝi emis deklari — ŝi ĝuis riĉan spiritan vivon kiel katoliko).

Ni memoru pri ili en niaj preĝoj.

Al la funebrantaj familioj, multajn kondolencojn.

NI DANKAS

Donacis monon al IKUE:

Belgio: De Clerck, Peters, Verstraeten; *Francio*: Amoureux, De Baillien-court, Georger, Thiollière, Vernin L., Vernin P.; *FR Germanio*: Concelaar, Gerling, Hartmann, Peters; *Hispanio*: Molera, Pi; *Italio*: Ciccanti, Di Prinzio, Leoni V., N.N. (Romo), Pendin, Ruaro, Scalabrella, Serratrice, Valvasori Peroni; *Japanio*: Matubara.

Donacis monon por la Misia Kaso de IKUE:

Italio: Magnani.

Donacis monon por la Fonduso « Pentekosto »:

Italio: Knoflach, N.N. (Rimini), Paroĥo « SS. Giovanni e Paolo » en Rimini.

Donacis Esperantaĵojn al IKUE:

Aŭstrio: Mudralk; *Ĉeĥoslovakio*: Berka, Šindler; *FR Germanio*: Kondor; *Germana Demokr. Resp.*: O.S.; *Italio*: Di Tocco, Migliorini; *Malto*: Mercieca; *Vatikano*: Radio Vatikana.

Al ĉiuj donacintoj, multajn dankojn.

● MONATO, internacia magazino sendependa, estas unika periodaĵo en la internacia lingvo. Eldonanto: TK/STAFETO, Miksebaan 65 A, B-2130 Brasschat, Belgio, poŝta konto 000-0422856-33. Ĉefredaktoro: Stefan Maul. 40 paĝoj DIN A4, riĉe ilustrita, 11 kajeroj jare. Jara abono: 960 belgaj frankoj aŭ egalvaloro.

● La 32-A Kongreso de KELI okazos en Burg-Haamstede, Nederlando, 17-24.7.82.

Informoj kaj aliĝiloj ĉe: s-ino Els van Dijk-Kuperus, Koningsmantel 4, NL-3403 HZ Alphen a/d Rijn, Nederlando.

● Kiu povos helpi min kompletigi la kolektojn de « *Espero Katolika* », « *Vojo-Vero-Vivo* », « *La Ĝusta Vojo* » kaj « *Katolika Sento* » (itala)? Ramon Molera, Sta Joaquina 13, Moia, Barcelona, Hispanio.

● La C.O. de IKUE (kaj, private, ankaŭ ĝia Direktoro Antonio De Salvo) bezonas plurajn malnovajn numerojn de « *Espero Katolika* ».

39-A IKUE-KONGRESO (Lille, 17-23.7.82)

Provizora programo

Sabaton 17.7.82

- 15-18: akcepto de la kongresanoj.
- 19: vespermanĝo.
- 20: interkona vespero.

Dimanĉon 18.7.82

- 9: unua prelego: « *Paco kaj homaj rajtoj* » (prezentado fare de la preleganto, diskuto en grupetoj, sintezo).
- Posttagmeze: solena S. Meso en la preĝejo « Saint-Saveur ».
- Predikos Past-ino J. Koopmans.
- Sac. Bernhard Eichkorn prizorgos la kongresan liturgion.
- 20: distra kunveno.

Lundon 19.7.82

- 9: diversaj kunvenoj (ekz. *Radio Vatikana, ilo de Monda Paco; Lernejo, instrumento de Paco; ktp.*).
- 11.30: Diservo.
- Posttagmeze: asociaj kunvenoj de IKUE.

Mardon 20.7.82

- 9: dua prelego: « *Paco kaj malarmado* » (Sac. Roger Degrelle).
- 11.30: Diservo.
- Posttagmeze: asociaj kunvenoj de IKUE.

Merkredon 21.7.82

- tuttaga ekskurso al la Flandraj Montoj. Matene: Mont Cassel (muelejo, de kie Marŝalo Foch observis la tutan regionon).
- Tagmanĝo en la restoracio « Au grand Saint-Hubert » en Berthen.
- Posttagmeze: Mont des Cats (Abatejo de Patroj Trapistoj: projekciado de diapozitivaj pri la historio de la Abatejo, Diservo en Esperanto, ebleco ĉeesti la trapistajn Vesprojn).

Ĵaŭdon 22.7.82

- 9: tria prelego: « *Paco kaj senperforto* ».
- 11.30: Diservo.
- Posttagmeze: asociaj kunvenoj de IKUE.
- 20: decidoj kaj konkludoj. Solena fermo de la Kongreso.

Vendredon 23.7.82

- 8: Diservo.
- 9: matenmanĝo kaj adiaŭoj.

En la kadro de la IKUE-Kongreso havos lokon ankaŭ la

1-A KONGRESO DE IKEK

dum kiu la infanoj, kun la helpo de f-ino Georgette Preux, travivos propramane la ĝeneralan temon « La Paco »:

Provizora programo

Sabaton 17.7.82

17-18: Interkona Renkonto.

La infanoj mem precizigos, kion ili volas en la programo de sia kongreso.

Dimanĉon 18.7.82

matene, unua temo: « *Paco kaj Infanaĵ Rajtoj* ».

Posttagmeze: promenado kaj ludoj.

17: Solena S. Meso.

Lundon 19.7.82

matene: diversaj okupoj (praktika kurso de Esperanto, Lernejo instrumento de Paco, Desegnoj de afiŝoj, ktp).

Posttagmeze: promenadoj, ludoj, kantoj, vizitoj, ktp.

Mardon 20.7.82

kiel lundon.

Merkredon 21.7.82

tuttaga ekskurso al la flandraj montoj.

Ĵaŭdon 22.7.82

matene: kiel lundon.

17: konkkludoj kaj decidoj por venonta infankongreso.

Vendredon 23.7.82

9: adiaŭoj.

POR MEDITI PRI LA PACO

Ne mortigu (*Eliro*, 20,13)

Ili forĝos el siaj glavoj plugilojn kaj el siaj lancoj rikoltilojn; ne levos nacio glavon kontraŭ nacion, kaj oni ne plu lernos militon (*Jesaja*, 2:4).

Vi estas aĉetitaj per prezo; ne fariĝu sklavo de homoj (*1Korintanoj*, 7:23).

Ne partoprenu kun la senfruktaj faroj de mallumo, sed prefere refutu ilin (*Efesanoj*, 5:11).

Oni devas obei Dion prefere ol homojn (*Agroj*, 5:29).

Ĉiuj, kiuj glavon prenas, per glavo pereos (*Mateo*, 26:52).

KONKURSO POR STIPENDIO « PENTEKOSTO »

Ĉe IKUE (Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista), via Berni 9, I-00185 ROMA, Italio, tel. (06) 7588388, estis starigita stipendio por studento aŭ studentino, katolika (laiko, pastro, religiulo), venanta el unu el la landoj de la tiel nomata « Tria Mondo ».

La stipendio estas nomata « PENTEKOSTO », honore al la Sankta Spirito en la 1600-jara datreveno de la Koncilio de Konstantinopolo, kaj por substreki la miraklan lingvan interkompreniĝon okazintan per la Sankta Spirito (Agoj 2), por superi la lingvan baron kiu disigis tiujn popolojn, kiuj estis formontaj la unikan, novan Dian popolon, la naskiĝantan Eklezion.

Por la jaro 1982-1983 (1.10.1982-30.9.1983) la stipendio konsistas el liroj 1.500.000; ĝis estos disdonata en du partoj, la unua en oktobro 1982 kaj la dua en septembro 1983.

La stipendio (kiu fontas el la rentumo de tiucela kapitalo) estos atribuita ankaŭ en la postaj jaroj; la sumo povos ŝanĝiĝi, sed, probable, en la senco ke ĝi iĝos pli alta. Ĉiujare okazos denova konkurso.

Rajtas prezenti kandidatojn la Misiuj Institutoj (viraj kaj virinaj), ĉiuj ekleziaj instancoj kiuj agadas en la Tria Mondo, la Estraranoj, la Komitatanoj kaj la Landaj Reprezentantoj de IKUE.

Ĉar la precipa celo de la stipendio kaj de IKUE mem estas la disvastigo de la Evangelio pere de la lingvo Esperanto (kiel okazas rilate la elsendojn en Esperanto de Radio Vatikana), kaj dua celo estas la diskonigo de Esperanto ĉe la katolikaj Instancoj kaj ĉe la Dia Popolo, la kandidatoj devas posedi jenajn kvalitojn:

1) devas temi pri civitano de iu Lando de la tiel nomata « Tria Mondo », en stato de malriĉeco;

2) li/ŝi devas esti student(in)o ĉe Universitato aŭ samnivela Instituto en Romo, kaj devas efektive restadi en Romo dum la tuta ekademia jaro;

3) li/ŝi devas resti en Romo almenaŭ du pliajn jarojn post tiu de la stipendio (nome, almenaŭ ĝis 30.9.1985);

4) li/ŝi devas sindevigi lerni kaj praktiki la internacian lingvon Esperanton, kaj helpi, dum almenaŭ 5 horoj en ĉiu semajno, la Centran Oficejon de IKUE en Romo aŭ ĝiajn iniciatojn (ekz. la elsendojn en Esperanto de Radio Vatikana);

5) li/ŝi devas sindevigi praktiki kaj propagandi Esperanton ankaŭ post reveno al la deven-lando;

6) li/ŝi devas esti katolika.

La kandidatiĝoj devas atingi la Centran Oficejon de IKUE (via Berni 9, I-00185 ROMA, Italio) ĝis 30.6.1982. La kandidatoj devos eksplicite deklari, ke ili posedas la kvalitojn kaj sindevigas (en kazo de gajno de la konkurso) plenumi la kondiĉojn supre indikitajn. La kandidatiĝoj devas esti akompanataj de prezenta letero de unu el la personoj aŭ instancoj, kiuj rajtas prezenti kandidatojn.

Kono de la itala lingvo estos aprezata.

Tiucela Komisiono, starigota fare de la Estraro de IKUE, asignos la stipendion limdate de 30.9.1982.

La Estraro de IKUE

Oni bonvolu traduki la supran tekston en naciajn lingvojn kaj ĝin vaste diskonigi al la nacilingva gazetaro!

DE ATLANTIKO ĜIS URALO

Oni ofte aŭdas, legas pri la eŭropa unuiĝo. La propono de la Papo havas vere « *revolucion valoron* » - kiel ni legis en EK. Al tiu unuiĝo de Atlantiko ĝis Uralo kondukas du vojoj; la reciproka ekkono kaj la reciproka kompreno.

La popoloj de Eŭropo apenaŭ konas unu la alian. Sennombraj estas la ekzemploj; preskaŭ ĉiu nacio havas unu epiteto kaj bedaŭrinde tio estas la tuta kono pri unu popolo, nacio. Plorinda fakto estas tio, ke la eŭropanoj scias kaj legas pli pri la palestinanoj aŭ pri ia afrika politika organizo ol pri siaj najbaroj. Precipe la malgrandaj popoloj estas supraĵe konataj. Kiu scias, ekzemple, ke en la najbaraj landoj de Hungario eĉ nun vivas pli ol tri milionoj da hungaroj kaj la tiea hungara literaturo estas tre signifa?

Koncerne la reciprokajn komprenon, ĉi-kaze ne pri tio temas, ke Eŭropo parolu unu lingvon, ne gravas kiun, por ke la eŭropanoj komprenu unu la alian. Tute ne pri tio temas. Jen la demando; ĉu la sama nocio, vorto, esprimo signifas la saman en la lingvo de ĉiuj eŭropaj popoloj. Pli klare; jen la homaj rajtoj. Ĉu la rajto pri religia libereco estas komprenata same ĉie de Atlantiko ĝis Uralo? Certe ne. Do, ne sufiĉas la belaj vortoj kaj ne sufiĉas fiksi tiujn en « kontraktoj, konstitucioj », eĉ se tio nomiĝas Fina Akto de Helsinki, se oni ne scias la signifon de la nocioj, vortoj, esprimoj en la praktiko, en la ĉiutaga vivo.

Kiel estus eble solvi ĉi tiun problemon? Nu, eble per Eŭropa Vortaro, Do, en ĉi tiu EV estus detale klarigita, kion signifas en la ĉiutaga vivo ĉi tiu aŭ tiu nocio, vorto. Mi scias, ke kompili tian vortaron estus ege malfacila entrepreno, sed sen tio la eŭropaj popoloj parolas unu kun la alia kiel du surdmutuloj. Ĉu ĉi tiu EV iam endoniĝos? Tutcerte neniam. Do, kion fari? Esperu. Esperu, ke iom post iom la pensmaniero de la eŭropanoj tamen proksimiĝos unu al la alia, precipe tiu de la nova generacio.

Al la proksimiĝo ekzistas pluraj paŝoj. Unu el tiuj estas sendube la iama unuiĝo de la kristanismo, en tia formo, kiu konvenas al la realo de la nuntempa vivo. Per kio povas ni esperantistoj kontribui al la unuiĝo? Ni povas doni komunan lingvon, Esperanton, kiu jam efektive vivas en ĉiuj europaj landoj, per kiu la eŭropanoj kapablas kompreni sin reciproke de Atlantiko ĝis Uralo.

Kaj ĉi tiu kontribuo ne estas malmulta.

S. Ĉapody, Hungario

Landaj reprezentantoj de IKUE

Oni pagu la abonkotizon al la landaj reprezentantoj, samtempe avertante pri tio la Centran Oficejon (por ke tuj estu en ordo la ekspedo de la revuo). La jara kotizo de membro-abonanto estas 22 svisaj frankoj aŭ egalvaloro. Pro la daŭra ŝanĝo de la kurzoj de valutoj, precipe de svisa franko, la sube indikitaj egalvaloroj havas nur informan celon.

Argentino

P. Bruno Ostropolski
Av. Libertad, 75
RA - 3360 Obera, Misiones

Aŭstralio

C.A. Sullivan
56 Royal Terrace
Hamilton
Queensland 4007

Aŭstrio

W. Mudrak
Beatrixgasse, 19/9
A - 1030 Wien III - p.f. 105.713
šil. 170

Belgio

H. Audenaert
Beekstraat, 6
B-9100 Lokeren
p.k. 000-0522242-91; b. fr. 400

Brazilo

P. Petro Urbaitis
caixa postal 4421
BR - 01000 S. Paulo, S.P.
cruz. 500 - aerp. 700

Britio

J. Harris
26, Dare Road
Birmingham B23 6PD
br. p. 6

Ĉeĥoslovakio

Aleš Berka
Na Vyhliedec 1002, p.s. 28
CS - 755.01 Vsetín

Francio

P. R. Degrelle
B.P. 23
F-54510 Tomblaine
p.k. 2555 38 L, Nancy
fr. fr. 60

F. R. Germanio

J. Kondor
Alte Schloss-Str. 25
D - 545 Neuwied 21 - Engers
p.k. 113726 - 673, Ludwigshafen
Rhein; gm 25

Hindio

P. O. M. Lucas, ofm Cap.
St. Mathias Church,
Ashok Nagar,
Madras 600083

Hispanio

Miguel Martinez
Av. da San José 105, pral 3a
Zaragoza - pes. 1.000

Hungario

P. Lajos Kóbor
Fő u. 58
H-9365 Dénesfa

Irlando

P. J. O'Reilly
« Monksilver », Howth Summit
Co. Dublin

Islando

Torfi Ólafsson
Melhaga, 4 - 121 Reykjavik

Italio

P. Duilio Magnani
Viale C. Zavagli, 73
I - 47037 Rimini (Forlì)
p.k. 18590364 (UECI) -
lir. 12.000

Japanio

Hatirō Matubara
Namimatu-tvō 4/5
596 Kisiwada-si, Oosaka-hu

Jugoslavio

P. Prof. Franjo Gruić
Strossmayerov trg, 5
YU-54400 Djakovo
din. 300

Kanado

Sino P. Proulx
790, 80-ème rue Est
Charlesbourg 7 Québec
G1H 1A9

Kolombio

Jorge Velásquez G.
Calle 54 No. 26-12
Apartamento 201
Medellín

Suda Koreo

P. Kiseng Kim
I.P.O. Box 2752 - Seoul

Madagaskaro

Roger Randrianekena
BP 14
Ambatondrazaka

Meksikio

P. J. M. Claramunt
Apartado postal 318
MEX-68000 Oaxaca, Oax

Nederlando

S. P. Smits
Dunantstraat. 164
NL 2713 VC Zoetermeer
p.k. 685124 - gld 27

Norvegio

S. Murak
Semsyn 166, N-1370 Asker

Nov-Zelando

G.D. Raynor
49 Sunny Grove
Wainuimata, Wgtn

Pollando

P. J. Gotter
Trzebnice 113
PL - 59312 Chocianowice
zl. 350

Portugalia

Port. Esp. Asocio
Rua Dr J. Couto 6 r/c A
P-1500 Lisboa 4
600 esk.

Svislando

P. Francisko Bommer
Collège S. Marie
CH - 1920 Martigny
sv. fr. 22

Tajlando

P. M. Perray
GPO Box 1846 - Bangkok

Tajvano/Formozo (Ĉinio)

P. Marko Ŭang Bu-jung
Catholic Church
4 Bei-bin Road
Hua-lian, Tae-ŭan R.O.C.

Urugvajo

R. Zeballos Morales
Av. Centenario 3099, C., Ap. 805
Montevideo

Usono

Mark B. Weddell
P.O.B. 1042
Indian Rocks Beach
Florida 33555
us. dol. 11 - aerpoŝte 15

